
ROK XXV.
GRUDZIEŃ
N-r 12.

JARO XXV.
DECEMBRO
N-o 12.

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ:



Barbakano en Kraków kaj pordego de S-ta Floriano.

# ESPERANTYSTA POLSKI
# POLA ESPERANTISTO

WYDAWCY: ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID TADEUSZ HODAKOWSKI REDAKTANTOJ

REDAKTOR ODPOWIEDZIALNY: JULJUSZ KRISS.

---

**PRENUMERATA:** rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

**ABONO:** jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztowej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

---

| OGŁOSZENIA: | | ANONCOJ: | |
|---|---|---|---|
| 1 strona | Zł. 60·— | 1 paĝo | Zł 60·— |
| 1/2 strony | „ 32·— | 1/2 paĝo | „ 32·— |
| 1/4 strony | „ 17 | 1/4 paĝo | „ 17·— |
| 1/8 strony | „ 10·— | 1/8 paĝo | „ 10·— |

---

## PRZEDSTAWICIELE — REPREZENTANTOJ.

**Katowice:** Soc. de Esper. Amikoj, Wawelska 3.
**Paryż:** S. Grenkamp, Paris 6. 4 rue de Vaŭgirard.
**Warszawa:** Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.

Przyjmują zamówienia abonament. i ogłoszenia do „Polskiego Esper." i „Pomocniczego Języka Świat."

Akceptas abonojn kaj anoncojn por „Pola Esperantisto" kaj „Pomocniczy Język Światowy".

---

## WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

**Atentu!** Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado".
Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—
Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

---

## DO P. T. CZYTELNIKÓW!

**Upraszamy uprzejmie P. T. Czytelników o załączanie znaczka pocztowego na odpowiedź, przy wszelkiej korespondencji, zarówno redakcyjnej jak i administracyjnej.**

---

**Do niniejszego numeru „Pola Esperantisto" dołączamy, jako bezpłatny dodatek „Książeczkę II. Zjazdu Pokongresowego w Białymstoku".**

# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE.

# ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

ROK XXV JARO | KRAKÓW GRUDZIEŃ 1931 DECEMBRO | Nr 12 N-o


## PRO LA FESTO DE LIBRO.

Ĉiu el ni konas la ideon de Julio Baghy, la ideon jam tiel enuziĝintan kaj, mi diru, eĉ tre ŝatatan, la ideon, kiu postulas de ĉiu Esperantisto, ke li la 15-an de decembro, naskiĝan tagon de la Majstro, aĉetu almenaŭ unu libron Esperantan, por tiamaniere pliviglígi la libroeldonadon kaj movadon en Esperantista libromerkato.

Pro tiu tago naskiĝas en la kapo kelkaj pensoj, kiujn mi volus prezenti al vi, karaj legantoj.

Vi scias, kiel grandan rolon ludis en komenca poresperanta pionira laboro Esperantistoj-poloj, laborintaj kiel tradukantoj. Nur du nomojn mi menciu: Grabowski kaj Kabe. Dank' al ili ni okupis en Esperanto-literaturo tre eminentan lokon. Esperantistoj novaj, volante ekkoni ĝisfunde la lingvon devis legi iliajn tradukojn, kiuj estis por aliaj popoloj modelaj ekzerciloj. Neniu nacio havis tiom da verkoj tradukitajn en Esperanton, kiom ni.

Sed tio estis. Nun ni devas forte timi, ke tiun honoran lokon, kiun ni posedis kaj kiun ni akiris, ni perdos en tre baldaŭa tempo. Delonge ĉe ni nenio eldoniĝas. Antaŭ kelkaj jaroj aperis noveloj de Sienkiewicz en traduko de Lidja Zamenhof. De tiu tempo silento. Mi diras nur pri literaturaĵoj.

Tiun staton ni devas nepre kaj senprokraste ŝanĝi. Ni estas ja tiom fortaj por ion valoran eldoni. Profitante la feston de libro, ni prezentas al vi, karaj legantoj, tute pretan projekton, kiu absolute devas realiĝi.

Ni posedas en bonega traduko de s-o Bronisław Kuhl „Ne-Dian Komedion" de Zygmunt Krasiński, kiu estas, kiel sciate, unu el perloj de nia literaturo. La libron ni devas eldoni. Ofertoj estas tre allogaj. **Ni ne volas profiti, sed prezenti al Esperantistoj veran juvelon — por malalta prezo.**

Konkrete: ĉirkaŭ 100-paĝa libro, tre bona papero, bela dukolora kovrilo en antaŭpago kostas nur 1.20 zł. Post apero de la libro 2.00 zł. Krome: ni destinas la libron kiel premion por abonantoj de Pola Esperantisto, **kiuj sendos la tutjaran nerabatitan** abonprezon por la jaro 1932 anticipe kaj antaŭ apero de la libro, kio plenumiĝos en januaro de la sama jaro.

Post du, tri tagoj vi ricevos mendilojn pere de „Pomocniczy Język Światowy". Ĉiu el vi, estimataj legantoj, pleniĝu la mendilon kaj sendu la monon. Mendu por vi kaj por viaj konatoj fremdlandaj kiel valoran donacon por ili. Ne forgesu ankaŭ ĉe la finiĝanta jaro pri la abonpago por „Pola Esperantisto" kaj „Pomocniczy Język Światowy". Plenumu nian peton kaj vian ďevon okaze de la Festo de Libro. Antaŭdankon!

**T. Hodakowski.**

# EN TAGO DE LIBRO

(15/XII—1931)

(Monologo de maljuna libro)

(Venas el apuda ĉambro. Parolas malrapide kun paŭzoj)

Mi havas la honoron prezenti min: mi estas libro. Libro Esperanta... Libro-avino, se vi volas... Mia nomo estas al vi bone konata: „Fundamento de Esperanto". Maljuna mi estas... Sed ĉiam vigla, freŝa kaj... bela. Jes... Mi naskiĝis en jaro 1903 en Warszawa sur strato Dzika Nr. 9, hodiaŭ, post longaj hezitadoj, fine — str. Zamenhofa. Mia patro estis la Majstro mem. Jes. Bedaŭrinde, li mortis, seď mi postvivas kaj glorigos lin poreterne.. Pardonu afable mian babilemon. Mi estas b a b i l e m u l i n o... Mi tre ĝojas vidi vin hodiaŭ ĉi tie, niajn karajn gastojn-aĉetontojn. Do mi plejkore salutas vin en nomo de miaj ĝekamaradoj el apuda ĉambro... Hodiaŭ estas taĝo Zamenhofa, tago de libro. Kiom da ĝojo, kiom ďa esperoj por ni, libroj esperantaj, en ĉi tiu feliĉa tago! Kaj ne nur por ni, ankaŭ por vi, por la tuta esperantistaro. Jes.. Tago de 15. XII. estas tago de komuna ĝojo. Ĝi rememorigas, ke antaŭ 72 jaroj en urbo Bialistok naskiĝis tiu, kies postea Esperanto montriĝis plej taŭga solvilo de la pachomara problemo. Tago por ni, libroj, speciale solena. Tago de nia liberiĝo. Oni prenos nin de la tablo aŭ breto venďeja. Ni fariĝos ornamo de privataj libraroj... Oni legos nin. Eble ne legos — ni kuŝos netranĉitaj. Sed tio ne ĝravas. Gravas, ke oni aĉetos nin... Plivigliĝos la libromerkaton. Kuraĝigos novajn aŭtorojn. Vivigos la literaturon.. Lingvo evoluos rapide...

Eĉ tro rapide. En la rapido oni perďos ĝian belon. Anstataŭe oni vestos ĝin per monstraj kunmetaĵoj. Forgesos pri la elementaraj principoj de Esperanto, ke **„Vortoj estas pli naturaj kaj bonsonaj, se ili estas ne kunmetitaj, sed uzataj aparte"...**

Tiujn vortojn de la Majstro vi legos en liaj „Lingvaj respondoj" sur paĝo 24. Aĉetu ĉi tiun plejgravan libron (post mi, kompreneble), se vi volas korekte kaj bele paroli aŭ skribi en Esperanto. Mi ripetas: „lingvaj respondoj de L. L. Zamenhof, plena kolekto"... Prezo? preskaŭ senpage! Hm... mi iomete deflankiĝis de la temo... Pri kio mi parol's, Pardonu.. mia memoro. Aha!.. jes. Ni, libroj maljunaj, posedas tutan virĝecon de la stilo. Niaj junaj kamaradoj (feliĉe ne ĉiuj), ofte havas stilon kaj lingvon, kiuj rompas la kapon al la leĝanto. Ni eĉ decidis are en nia intereso kaj en intereso de la tuta esp-aro senďi deleĝacion al la Lingva Komitato kun peto malpermesi la aperigadon de libroj ne aprobitaj. Naskiĝu nur libroj bonstilaj.

Aliaj estu abortataj tuj ĉe ilia komenciĝo. Jes. Pardonu milfoje. Mi volis hodiaŭ elŝarĝi mian koron. Mi dirus al vi ankoraŭ multe pli, sed mi timas trouzi vian paciencon.

Do, finante, mi deziras al vi ĉiuj, karaj kaj baldaŭaj, malavaraj niaj posedantoj, bonan sanon, feliĉan jaron kaj multe, multe da mono. Ne ŝparu kelkajn monerojn!

Forprenu nin el la apuda ĉambro. Faru al ni la ĝojon kaj lokon por aliaj libroj, niaj posteuloj. Vivu Esperanto, kiu donis al ni la vivon, kaj al mi la okazon alparoli vin amike.

Ĝis revido — tie... (en ĉambro apuda) (forirante en direkto de la ĉambro). Tie vi trovos krom mi multajn, aliajn tre interesajn librojn. Ĉiuj bonstilaj, modelaj.. Fuŝverkojn ni forigis el nia anaro.. Latine oni diras:

— Bis dat qui cito dat.

Kaj mi diras:

— Duoble aĉetas, kiu rapide aĉetas.

(riverencas kaj foriras).

1931—XII. Fez.

K. MAKUSZYŃSKI (MIAJ LETEROJ).

# LAŬDO AL LA LIBRO.

**LA LIBRO** — JEN RADIECA MIRINDAJO, JEN ORA FAJRERETO, JEN PECETO DE L' KORO, JEN RADIO DE ETERNA SUNO, KIU LUMAS SUR VOJO AL ETERNECO. ĜI ESTAS KUN NI, KIAM ESTAS MALGAJE KAJ ĜI RIDAS KUNE KUN NI. SEN ĜI ASPEKTUS NIA VIVO KVAZAŬ GLACIA DEZERTO, DURA, TERURA KAJ MORTA, LA VIVO SEN REVOJ, SEN POEZIO, SEN ILUZIOJ, SEN ĈIELARKO KAJ SEN TIO, KIO JETAS BRILON SUR ĜIAN KRUELECON. ONI POVAS EN MIRAKLA LIBRO PER SERIOZA RIGARDO RIMARKI ĈION BELAN: ANIMON ĈIELARKOKOLORAN, KORON PLENAN DE DOLĈECO, RIDETON DE NEKOMPAREBLA BELECO, ĜISLARMAN KORTUŜON, KOMPATON SENFINAN, HELECON DE L' RIGARDO, SENTEMON, SAĜECON SINCERAN, SUFERON PROFUNDAN, DOLORON NEESPRIMEBLAN, MALĜOJON MIRINDEGAN. KIE NE ESTAS LA LIBRO, TIE EN VIVO DE L' HOMO FARIĜAS MALBONA MALPLENECO, KIUN ONI POVAS NENIEL PLENIGI, TIE SEN ĜIA RADIO VAGAĈAS NEBULOJ KAJ DORMIGAJ VAPORAJOJ, NASKIĜAS SENSUKECO KAJ LA PLEJ TERURA MALSANO DE L' ANIMO: ENUJO. LA HOMO VELKAS SEN BONA LIBRO KAJ SEN ĜIA SUNECA ILUZIO, SEN ĜIA PUREGA POEZIO KAJ SEN KANTO DE ĜIA KORO, KIEL VELKAS LA FLORO SEN SUNO. LA LIBRO INSTRUAS LA KORON PRI LA BONECO KAJ AMO, INSTRUAS PRI LA SANKTECO DE L' SUFERO KAJ SERENECO EN DOLORO. LA LIBRO ESTAS SAĜULO MILDA KAJ PLENA DE DOLĈECO. MALPLENAN VIVON ĜI PLENIGAS PER LUMO, KAJ MALPLENAN KORON PER KORTUŜO. AL LA AMO ĜI DONAS FLUGILOJN, KAJ AL PENSO ĜI DEPRENAS ŜARĜON. EN SENVIVECON DE L' HEJMO ĜI ENKONDUKAS VIVON, KAJ AL LA VIVO ĜI DONAS SENCON. LA LIBRO POVAS ĈION.

Tradukis: T. Hodakowski.

# ZAKOPANE

## ĈEFLOKO DE VINTRAJ SPORTOJ KAJ SOMERA TURISMO EN POLUJO.

La pola ebenaĵo ĝenerale finiĝas en sudparto de la lando per nordaj deklivoj de Karpatoj. Inter tiu montĉeno formas Tatroj eminente elstarantan granitmasivon, krute supreniĝantan el la montaro, al kiu ili apartenas.

Tatroj distingiĝas per siaj montsuproj, kiuj atingas pli ol 2600 m. kaj per sovaĝromantika karaktero, kiu en aliaj altaj montaroj apenaŭ ekzistas.

En relative malgranda detranĉaĵo 60 km longa kaj 20 km larĝa ni trovas centojn da pintoj kaj seloj, kiuj ĉiuj konserviĝis en la fendriĉa prastato de la granitformacio. Pro tiu individua karaktero estas la altaj Tatroj la celo de multaj tre interesaj kaj emociaj ekskursoj.

Kiel centropunkto de la turista trafiko evoluis apud iliaj piedoj ZAKOPANE. Ĝi estas hodiaŭ la plej granda kuracejo, en kiu la gastnombro jaron post jaro kreskas, instigate per la kreado de ĉiaj penseblaj novaĵoj kaj atrakcioj kiel en aliaj eŭropaj montcentroj. Malgraŭ tio havas Zakopane propran inviduan grundspecon en la arĥitektonika formigo kaj ankaŭ la interesajn morojn kaj kutimojn de la rasaj montloĝantoj (Górale) kaj stampas krom sia moderna kulturo al eksterlanda vizitanto specialan kaj apartan ĉarmon.

Nun posedas Zakopane pli ol 200 pensionojn luksajn, kaj tre modestajn, krome kelkajn hotelojn kaj kuracdomojn. La nombro de la kuraciĝantoj kaj turistoj dum la jaro superas 40.000 personojn, kaj **la partopreno de la eksterlandaj vizitantoj ĉiam pli kreskas.**

Zakopane kuŝas akurate 1000 m super la marnivelo kaj posedas specialajn klimatajn ecojn pro la malalta atmosfera premo, malgranda humideco, forta sunefiko, ventŝirma situo, krome la riĉaj neĝadoj en la vintro, eksterordinara aerpureco kaj fine la maloftaj nebuloj. Tiukaŭze rekomendiĝas Zakopane tiel ĉe la pulmmalsano (komenca tuberkulozo), kiel ankaŭ ĉe la kataro de pulmpintoj, kaj de pli altaj spirorganoj, fine por la saniĝantoj post suferita pulminflamo kaj gripo. Ĝi montras ankaŭ brilajn efikojn ĉe la kuracado de anemio, klorozo, neŭrastenio, malsano de Basedov, malario, kiel ankaŭ perturbacioj de digestorganoj.

Sed plej rapide evoluas Zakopane kiel ideala ripozloko kaj rendevuejo de elito de pola socio, precipe el Varŝavo. La vivado koncentriĝas krom en luksaj hoteloj kaj pensionoj en la kafejoj, dancejoj restoracioj, ĉe multaj prezentadoj en la teatroj, koncertoj, ekspozicioj de la artverkoj k. t. p.

Ĉiujare okazas en Zakopane internaciaj aŭto- kaj motociklovetkuroj kaj el aliaj diversaj multaj somersportoj citinda estas la fiŝkaptado. El la granda amaso da atrakcioj oni devas nomi ĉe unua loko la vintro-sportojn. Zakopane posedas la plej grandan skisaltejon sur la kontinento, plu „Bobsleigh"- kaj „Rodel"-vojojn, glacikurejojn k. m. a.

En la montaro ekzistas du rifuĝejoj t. e. unu ĉe la lago Mar-

okulo (1393 m), dua sur t. n. Hala Gąsienicowa (1500 m), malfermitaj dum la tuta jaro.

La prezoj estas je 30% ĝis 50% pli malaltaj ol eksterlande en la kuracejoj de la sama rango.

Zakopane havas la oportunajn senperajn rapidfervojokuniĝojn kun Varŝavo kaj Poznań, ankaŭ kunkurantajn dormvagonojn.

De la eksterlandaj fervojokuniĝoj kondukas la plej mallonga tra Krakovo. Rapidvagonaro Berlin-Bukarest kaj tiu de Parizo-Vieno-Krakovo-Lvovo. En la somersezono trafikas sur la linio Krakovo-Zakopane kaj reen luksaj rapidaj aŭtoĉaroj, kiuj tiun vojon faras en 3 horoj.

El Krakovo oni aranĝas aŭtorondveturojn ĉirkaŭ Tatroj tra Zakopane, Javoĵina, Schmecks, Waagvalo al Arvakasteloj kaj reen kaj ankaŭ por favori la internacian turistikon, jam en nuna sezono — aŭtoveturojn de Krakovo tra Zakopane ĝis Marokulo, al Schmecks kaj Poprad Velka, stacio kuniĝanta kun rapidvagonaroj de la Kaschau-Oderberg-fervojo en la Ĉeĥoslovakujo.

La direktado de la ekskursorganizado kaj de la konstanta aŭtotrafiko estas en la mano de „Asocio por favori la turismon en Polujo" Krakovo, Szpitalna-str. 36, telef. 11385, kie oni povas ankaŭ ricevi ĉiajn detalajn informojn rilate la restadon en Zakopane, liberajn loĝejojn k. t. s.

En Zakopane mem donas ĉiajn respektivajn informojn la Direkcio (Ĉefplaco).

Tradukis: **Dr. Leon Żupnik.**

Z. KLESZCZYŃSKI.

## ĈAGRENO DE SANKTA NIKOLAO.

Sankta Nikolao timis iom sanktan Petron kaj sentis por li grandan respekton, tamen tiun fojon li ne plu eltenis.

— Mi ne prenos! — obstinis la Sanktulo. — Kiel mi vin, Petro, respektas, ne prenos! Eĉ ne revu!

Sankta Petro ekridetis indulgeme.

— Ĉiujare estas kun vi, karulo, la sama historio...

— Ne la sama.

— La sama.

— Ne la sama. Je l' fotografa aparato mi konsentis. Kaj je l' bicikledo ankaŭ. Kaj je l' gramofono. Kaj je aliaj novajoj.

— Ba! Kaj ĉu vi memoras, kiom vi tiam koleris?

— Estas eble, ke mi koleris, ĉar mi estas malnovmoda sanktulo kaj ne ŝatas ĉi tiujn diversajn maŝinetojn... Sed mi konsentis! Mi cedis al vi, sankta Pordisto! mi obeis! Mi puŝis ĉion ĉi en miajn vojaĝsakojn kaj ĝojigis l' infanojn? Ĉefe pro ili! Ĉar se laŭ mia gusto, do mi kiel antaŭe... ĉevaletojn... soldatojn... pupojn... frandaĵojn... nu kaj vipfaskon por ĉiu eventualaĵo... Tamen vi diris: aparaton — mi prenis ankaŭ aparaton; vi diris poste: bicikledon — mi prenis la bicikledon. kvankam min tiu historio pikis surdorse kaj per pedalo disŝiris la sakon. Vi diris gramofonon — mi enpakis ĝin! Kvankam verdire, Petro, apenaŭ mi tiam ne pekis... Kiom longe Kristnaskajn kantojn ili ludis, bone... Sed ili prenis kaj ekludis iun pecon, ke mi ekruĝiĝis pro honto. Mi ŝtopis l' orelojn kaj forkuregis rapide...

— Nu vidu. Nenio terura okazis.

— Eh, Petro! Vi tro estas indulgema por la homoj!

— Certe! Ĉiutage mi havas ĉi tie klopodojn kun la pekuloj. Bele mi aspektus, se mi pro io ajn ruĝiĝus.

— Ba!

— Nu, ĉu vi prenos?

— Ne.

— Ne?
— Ne!
— Kaj se mi dirus al vi, ke tio ĉi estas nenia diablaĵo?
— Tamen ĉu oni povas tion scii?
Tie ĉi sankta Nikolao iom ekhontis, ĉar li sciis, ke diablaĵo ne povas ekzisti en proksimo de Dia trono.
Tamen ĉar li estis sanktulo iom ekscitiĝema kaj ankaŭ sufiĉe obstina, li frapis kolere per la piedo.
— Mi diris, ke ne, do ne!
Sed sankta Petro konis kontraŭ sankta Nikolao rimedojn. Li ofendiĝis nek pro l' obstino, nek pro l' malobeemo (neniu en la ĉielo ankoraŭ piedfrapis kontraŭ la Pordisto de Dio), nur li fermetis unu okulon, alrigardis signifplene sanktan Nikolaon kaj diris disetendante la manojn:
— Kion fari? Se vi ne volas, do ne.
Kaj poste ankoraŭ aldonis forirante:
— Tamen l' infanaro ĉagreniĝos...
Sciis bone sankta Petro, kion li faris. Ĉar sankta Nikolao havis por l' infanoj koron amantan kaj molan, kiel vakso... Kaj pleje li ne toleris infanajn larmojn. Li preferus ĉion, nur ne larmojn de tiuj etuloj...
Li kutimis paroli:
— Sufiĉe ili plorados en la vivo, kiam ili plenkreskos!
Tial do okazis, kiel antaŭvidis la Dia Pordisto. Sankta Nikolao treege konfuziĝis. Li hontis kapitulaci, komencis movigi la lipharojn kaj la barbon premŝiri kaj sulkigi la frunton...
Senhelpe...
Fine li alrigardis sanktan Petron el sub la grandaj, grizaj brovoj unu kaj duan fojon kaj diris kvazaŭ minace, sed efektive bonkore:
— Nu, donu do tiun ĉi radjon... Mi portos!
Kaj jen tiel okazis, ke en la vojaĝsakoj de sankta Nikolao trovis sin ankaŭ radjo, la plej granda ĝojo de l' infanoj, la plej dezirinda donaco.
Baldaŭ konvinkiĝis sankta Nikolao, ke li kaŭzis al la homoj sur la tero plezuron, kaj mem li ne tro estis ŝarĝita.
Frapis lin ankaŭ io — absoluta manko de plendoj.
Ĉar oni devas scii, ke ĉe tia amaso da donacoj la sanktulo iafoje eraris kaj lasadis en la hejmoj, kie estis sole knaboj, pupojn, kaj, kie estis knabinoj, plumbajn soldatojn.
Okazadis ankaŭ kun tiuj soldatoj, ke la sanktulo eraris pri la limoj de la teraj ŝtatoj — tiam estis konfuzo. Iu germana Fritz ricevis francajn piou-piou en blu-grizaj surtutoj, iu franca René plumbajn kavalirojn en pikelhaŭboj, iu pola Leszek litovajn ŝaŭlisojn.
En radjo tiaj malagrablaj eraroj estis ekskluzivitaj.
Eĉ kontraŭe...
Aŭskultante la infanajn voĉetojn, ĝojplenajn kaj purajn, en iu momento ekpensis la sanktulo, ke radjo kvazaŭ efektive forigadis la limojn dividantajn la naciojn je malpacaj kaj malamikaj tendaroj kaj ke laŭ la takto de Kristnaskaj kantoj, transsendataj al ĉiuj, malfermiĝis pli larĝe la homaj koroj, al kiuj la ploretantaj anĝeloj antaŭe vane serĉis orajn ŝlosilojn.

**Tradukis el la pola lingvo Baroko.**

TADEUSZ BILIŃSKI.

# LA ĜARDENO DE PETRO JOHANO VIKO.

Malgraŭ du antaŭnomoj Petro Johano Viko nek estis poeto, nek romanverkisto, sed li estis impostoficisto kaj... fraŭlo.
Eble tio ŝajnos al iu stranga, sed Petro Johano havis... „idealon", al kiu en la soleco de sia koro li starigis kapeleton.
Tiu idealo ne estis — kiel kutimis okazi inter liaj ofickamaradoj — ia Zonjo aŭ Manjo, ĉar Petro Johano neniam faris tion, kion faras la aliaj, sed tiu idealo estis ...la ĝardeno.

Jes... lia idealo, lia granda amo kaj pasio de lia tuta viro estis la ĝardeno, kiun li ne havis, kaj kiun li deziris havi je ĉiu prezo.

Petro Johano Viko — kiel ni jam menciis — estis impostoficisto. Oni scias, ke ne „superverŝiĝas", kiam oni estas eĉ stabila oficisto — tamen oni povas iel vivteni sin, se oni estas, kiel Petro Johano, „seninfana" fraŭlo kaj se oni havas malgrandajn bezonojn.

Kiam dimanĉe liaj ofickolegoj iradis posttagmeze, ekster la urbon, por drinki bieron en societo de siaj edzinoj aŭ hazardaj amikinoj, kaj por manĝi svisan fromaĝon kun acida kukumo, en tiu sama tempo Petro Johano Viko staris ĉe fenestro de sia ĉambro kaj kalkulis malgrandajn, blankajn nubetojn, ŝafetojn, kiuj kuradis tra la blua kampo aŭ li vagadis, for de homoj, en la urboparko. Tiam li pensis pri „sia" ĝardeno.. Kaj tiu ĝardeno ne estis ia „ordinara" enuiga ĝardeno, kun granda angle tondita herboplaco kaj kun kelkaj, apenaŭ floraroj disĵetitaj ĉe la randoj de la gazono. Ne... en lia ĝardeno devis svarmi pro floroj, suprenŝpruci per kaskado de tre helaj koloroj, bruli kaj brileti, ke la okuloj doloru, kiam oni rigardis la florojn!

Do iu malnovmoda ĝardeneto kaj meze sur la bastono la granda arĝenta vitra globo, en kiu respeguliĝus la tuta lukso de koloroj.

Tiu vitra globo estis preskaŭ la plej grava objekto. Li simple vidis ĝin ĉiam antaŭ siaj okuloj, kiel ĝi briletis en radianta plena suno kaj fajreris per mil koloroj.

Kiam dimanĉo pasis, liaj kolegoj havis maldolĉajn mienojn kaj tolon en... la poŝo. Samtempe Petro Johano Viko, antaŭ ol li dormiĝis, li ekprenis el la monujo misteran ŝlosileton, li malfermis malgrandan feran skatoleton kaj enmetis ion: poste li ĝin fermis zorgeme. En tiu skatolo kaŝis sin „lia ĝardeno", kvazaŭ tiu genio el „Mil kaj unu noktoj", fermita en la vazo kaj atendanta ekliberiĝon.

Kaj tiu tago alvenis, eĉ pli frue ol li esperis. Tiutage Petro Johano ekprenis la tutan enhavon de l' skatolo kaj... aĉetis la ĝardenon, kiel sian ekskluzivan „propraĵon". Poste li aĉetis grandan aron da semoj kaj florplantoj. Estis nur floroj, neniaj fruktoj aŭ legomoj. Nenio praktika aŭ utila. Tia ĝardeno devis esti unu granda floraro. Nuntempe li nek vagis plu tra la urbparko, nek kalkulis nubetojn sur la ĉielbluo; nun li jam havis fine sian propran ĝardenon. Kaj kian ĝardenon!

Floroj kaj floroj senfine, en ĉiuj koloroj kaj nuancoj. Do ardantaj peonioj apud modesta kaj bonodoranta rezedo, veluraj trikoleretoj, rozkoloraj kaj blankaj papavoj! Poste flamaj lakfloroj kaj enamiĝintaj je si narcisoj, malvoj, tuberozoj kaj nikotianoj! Plejmulte tamen li ŝatis helverdajn kaj liliajn iridojn, kiuj suprenleviĝis superbe...

Kaj kiam la vento ekblovis, subtila poleneto elŝutiĝis el la floroj kaj turniĝis kiel la pluvo en la aero. Tamen lia ambicio estis la rozoj: malhelruĝaj, kiel purpuro de la reĝa mantelo, delikataj, kremkoloraj kun rozaj vejnetoj, kiel la vangoj de la plej bela virino, kaj fine tute neĝoblankaj, puraj kaj sanktaj.

Kaj meze de tiu ĉi beleco grandega radianta globo, kiu ensorbis kaj disĵetis malavare brilojn kaj kie en ridiga mallongigo respeguliĝis la tuta ĝardeno de Viko kaj li mem, kun platigita grandega kapo, kun eta korpeto kaj mallongaj piedetoj.

Petro Johano Viko estis tre feliĉa. Li sidis en sia ĝardeno, li banis sin en la suno kaj admiris tiujn Diajn mirindaĵojn. Tio, kion li nun havis, superis liajn plej kuraĝajn revojn, ĉar ne nur la floroj kaŭzis al li mil ĝojojn — kiam ili kreskis kaj disvolviĝis — sed ankaŭ tiu tuta senlace zumanta, svarmanta insektaro, kiun allogis miela aromo de la ĝardeno, zorgis ankaŭ pri tio, ke Petro Johano Viko havu plej multajn distraĵojn.

Kaj tiel sidante en la ĝardeno li observadis diligente la armeon de formikoj, kiu marŝis kun serioza atento tra la ora sablo de la piedvojeto. Ili iras antaŭen, elsendinte la antaŭpostenojn... Subite.. „Haltu"! Ili haltis kiel fiksitaj en la tero. „Kio okazis?" „Malhelpo". Malgrandeta marĉeto haltigis la marŝon antaŭenigitan de la „ĉefa komando".

Momento de la hezitado... kaj baldaŭ ĉirkaŭirante la marĉon, ili denove marŝas rapide antaŭen.

Kun infana ĝojo li malkovris sur la folioj kaj en la kalikoj de l' floroj, la kokcinelojn, tiujn „diajn bovinojn", kaj grandan aron da verdaj skarabetoj, kies nomon li ne konis, li rigardadis al ili longajn horojn, kiam ili, briletante per smeraldaj tegiloj, suprenrampadis la trunketojn kaj la foliojn, kiuj malsuprenfleksiĝis sub ilia pezo, por fine atingi la „mielan havenon". En la aero blankiĝis pro neĝaj papilioj, kiuj interŝanĝis rapidajn kisojn. Ili defalis milde sur la karessoifantajn kalikojn de la floroj kaj poste ili denove flugis antaŭen, tiamaniere plenumante sian pluenplantigantan laboron.

Ofte li vidis kiel per vento portataj semoj falis en larĝe malfermitan internon de la floroj kaj li aŭskultis interese la zumadon de diligentaj abeloj, ne timante ilian pikilon. Unu fojon li eĉ ekvidis la reĝinon de abeloj, kiel ŝi suprenleviĝis pli kaj pli supren por renkonti la sorte designitan kavaliron, kun kiu ŝi devis soleni sian edziĝan feston.

Svarmis kaj zumis, murmuretis kaj flirtis en Vika ĝardeno; oni serĉis sin recipoke kaj oni trovis sin, oni trinkis iomete mielon, oni banis sin en la roso de l' floroj kaj oni dancadis en la sunbriloj. Vidante tiom da mirindaĵoj Petro Johano Viko ĝojis kaj ridetis dolĉe: Ĉio ja apartenas al li, al li sola. Al neniu en la oficejo li diris pri sia ĝardeno.

Tamen — ne sciate kiel — oni eksciis fine pri ĝi. Unu tagon tiu sciigo disvastiĝis en la oficejo: „Petro Johano Viko havas sian ĝardenon".

— Ni devas lin viziti... mizerulo enuas certe en sia ĝardeno, sidante ĉiam nur sola.

Kaj jam dimanĉe ili venis amase al li: — Jes, sendube, la ĝardeno estas bela... ni konsentas pri tio. Kaj la sekvantan dimanĉon ili venis denove, tamen jam ne solaj, sed en akompano de siaj „amikinoj" Ili ordonis alporti la bieron kaj la fromaĝon, ili ridis kaj bruis, tre laŭdante la ĝardeneton de Viko. Baldaŭ la flavaj zorgeme sarkitaj piedvojetoj, altkreskaj herbejoj kaj floraj bedetoj estis kovrataj per cigaredrestaĵoj kaj kolbashaŭtetoj. La knabinoj rompis la florojn, por forĵeti ilin, kiam vespere ili estis jam velkintaj. La knabinoj persekutis la papiliojn, kiuj, ne alkutimigitaj al la vido de tiom da bruantaj kaj fumantaj homoj kaj ekterurigitaj, forlasis la ĝardenon, same, kiel la

abeloj, per la fumado narkotitaj, kiuj rifuĝis al malproksimaj abelujoj.

No.. dank' al Dio... tiuj abomenaj, malbelaj abeloj jam foriris, la knabinoj ĝojis, kurante nuntempe sen ia timo en Vika ĝardeno. De nun ili venadis ĉiudimanĉe...

Petro Johano Viko sidis aparte ne partoprenante la ludon kaj li sentis pli kaj pli klare, ke li estas tie tute ne necesa. Cetere la kamaradoj ne zorgis tute pri li, forgesinte pri lia ekzisto.

— Eh, maljuna enuiganto kaj strangulo — fine ili decidis kaj, mendante ĉiam novajn botelojn, ili drinkis, ludis kartojn kaj bruegis. Unudimanĉe Petro Johano Viko ne venis jam al „sia" ĝardeno.

— Ni ne bezonas lin... li nur ĝenas nin en nia amuzaĵo per sia ĉiam malkontenta mieno.

Kaj nun li ne devis jam sin ĝeni... ili pli drinkis ankoraŭ, ridis kaj bruis senfine.

* * *

En la sama tempo Petro Johano Viko staris ĉe la fenestro de sia ĉambro kaj kalkulis malgrandajn blankajn, lanajn nubetojn ŝafetojn, kiuj kuradis tra la blua kampo, kaj li... pensis pri „sia" ĝardeno

IRENA SZCZEPAŃSKA.

# MIA UNUA AERVETURADO.

Onklo Tadeo estis ĉiam „terura infano". Malgraŭ, ke infaneco estis jam por pli malreala sonĝo. Ĉarma, infana, senkulpa koro. Juna, freneza fantazio. Rideto sur la lipoj kaj en la animo. Senzorgeco kaj bonhumoro gvidis lin tra strange malgaja vivo, kiu por li estis senĉese bela deziro.

Li estis artisto, infano de l' Dio, amo kaj arto. Sed kial „terura infano"?... Ĉio nekomprenebla estas por homoj terura.

La onklo estis ankaŭ infano de l' feliĉo. Ĉiuj revoj de lia riĉa vivo plenumiĝis!

Sed la tero kun ĉiuj siaj valoroj ne sufiĉis por onklo Tadeo.

Kiel li venkis teran vivon, li volis venki aeron. Ĉiuj konatoj kaj malkonatoj estis sufokataj. La onklo aĉetis aeroplanon!

Generale ĉiu seriôza homo en aĝo de la onklo, havas jam pension kaj lia vivo fariĝadas de tago al tago pli trankvila kaj silenta ĝis la morto.

Do la facilanima onklo aĉetis belan, malgrandan aeroplanon kaj flugadis kiel papilio, malgraŭ siaj naŭdek kilogramoj.

Ĉiuj fraŭlinoj amas malordinarajn agadojn en sia griza vivo. Do mi preskaŭ adoris la ĉarman onklon Tadeon, kiu similis al ni. Mi ofte konfesis al li miajn plej kaŝitajn fraŭlinajn sekretojn. La aminda onklo instruis al mi belecon de l' vivo kaj arto.

Tiufoje mi flustris al la orelo de la amika onklo. miajn du grandajn revojn de mia deziranta koro. Mi nepre devas flugi kaj ami.

La saĝa onklo verdiktis grave kiel reĝo Salomono, ke estas tre facile kontentigi min per la plenumo de tiuj revoj.

Mi enamiĝos onklon, kaj li flugos kun mi en aero. Konsilo estis

tute klara kaj facila. Bedaŭrinde la onklo malgraŭ sia juna koro, havis ja kvardek kelkajn jarojn! Mi preferis nur flugi kun li...

La amo kaj la flugado estas tute simila, danĝera afero. Homo fluganta, same kiel homo amanta, estas ĉiam en nuboj. Unu kaj la alia povas ekfali de l' ĉielo, kaj rompi nukon aŭ koron. La efiko estas egale plorinda. La analogio estas tre granda, malgraŭ ke ne tuj videbla.

Sed tiutage ni ne povis flugi, ĉar mankis vetero. Mi devis atendi tutan nokton kaj tutan tagon! Kion signifas eterneco kompare kun atendado?

Dum la tuta nokto mi terure sonĝis. Mi flugis, sidante sur malgranda ruĝa ombrelo kiel fajra birdo fluganta tien kaj reen. Faladis steloj, batante mian kapon. Fine la ruĝa ombrelo ŝanĝiĝis je blankaj veloj de l' boato kaj mi eknaĝis oceanon.

La mateno estis malgaje deprima. Grizegaj nuboj malheligis la ĉielon. Arĝentaj pluveroj ridetis de mia ĉagreno. Ili sonis malice, frapante brueme al mia fenestro. Sonorilo de l' telefono tranĉis aeron. La bona onklo informis min, ke vespere la vetero fariĝos trankvila kaj dolĉa

Do je la sepa horo vespere ni du teruraj infanoj forlasos la enuigan teron por serĉi novajn emociojn.

Horoj, kiuj antaŭis vesperon, estis senfine longaj. Ĉiu konsistis el ruĝa emocio, verda malpacienco kaj flav-fajra deziro.

Por fari ion, mi vizitis miajn konatojn. Sed memkompreneble nur la aervojaĵo interesis min. Tial mi ne povis longe silenti, kaj mi rakontis al ĉiuj pri niaj projektoj.

Granda fulmotondro freneziĝis en tiu momento. Unu juna kuracisto prenis mian pulson, ĉu mi estas malsana. Li bedaŭris, ke li ne estis psika kuracisto, ĉar li ne povis konstati, ĉu mia cerbo estas tute normala.

Ĉiuj kriis laŭtege kaj koleris je mi kaj mia ĉarma onklo.

Timo estas ridinda sento. Timo pligrandigas la aferon, blindigante la sanan racion.

— Fraŭlino! — ekvokis maliuna sinioro sen unu mano — mi estis milfoje dum la milito en teruraj danĝeroj. Mi eĉ perdis mian rektan manon. Sed neniam mi flugos en la aero. Bona Dio gardu min!

Kaj la horoj senĉese unu post la alia alproksimiĝis strangan vesperon de fraŭlina, senzorga vivo. Estis iam lasta momento por veturi al onklo Tadeo. Tiu atendis min maltrankvile. Ne estus por li agrable, se mi malkuraĝiĝus. Poste du telefonoj parolis kune. Aparato onkla kun aparato de aeroplanejo.

— Ĉio estas preta! — vokis venke nigra telefono kaj mia koro emocie batadis. Mi tuj kun la onklo forkuris el la ĉambro. En tiu minuto ankoraŭ foje kriegis telefono Mia patro volis haltigi du frenezulojn. Sed belega destino aranĝis alie.

Mi kun onklo Tadeo enaŭtomobiliĝis kaj ekveturis rapidege. Unu penso, unu deziro gvidis kun mia onklo la aŭtomobilon. Puŝita policisto trovinte sin en vera danĝero enskribis nin en sian notlibreton. Tio malgravis! Teraj aferoj ne interesis nin plu.

— Ĉu vi havas bonan koron? — demandis min serioze la onklo.

— Jes. Bonan, ŝtonan kaj sanan! — mi respondis sufiĉe trankvile, malgraŭ ke la dentoj klakadis nervoze.

— Ne forgesu karesi nian katinon en aeroplanejo. Sen ŝia bonvolo ni povus ekfali de l' aero.

Ĉiu homo fluganta havas siajn talismanojn, kiuj speciale portas al li feliĉon.

Estis tre ridinde troviĝi en granda, fremda vestaĵo, kun okulvitroj. Mi kun la onklo ŝajnis esti Eskimoj, malgraŭ ke tio estis monato majo. Mi saltadis pro ĝojo, sed tiumomente io pepis apud miaj piedoj. La haroj hirtiĝis sur mia kapo pro freneza timo. Tio estis... la nigra katino, kiun mi neatente frapis per mia piedo.

Nia sorto estis do certa!

Neniu akompanis al la du kuraĝuloj. En la aeroplanejo tio estis tute ĉiutaga afero. Neniu miris. Tio pikis mian koron.

Komence grandega bruo de malviva birdo surdigis min tute. Ni turnis nin kelkfoje sur la tero. Estas malfacile forlasi tiun teron!! Poste eta balancado sed tre agrabla. Iomete memoriĝis lulilo.... Sed kia ŝanĝo fariĝis dum kelkaj minutoj? Ĉu malsupre ekzistas la sama tero, de kiu ni estas? Ridinda infana ludilo en mano de granda universo. Ĉu estas eble, ke ni povas vivi en tiu malgranda parteto de l' mondo, ne provante liberigi nin?

Ĉio fariĝis malreala. Vistulo kiel fraŭlina rubando. La tero desegnita per infanaj fingroj. Nur mi kun la onklo estas grandaj kiel ĉiam. Ekbriliĝis lanternoj de l' urbo. Ili lumis kiel perla rozario en mano de roz-griza vespero.

Ni estis tiel supre, ke mi tute ne sentis, ke ni flugas. Palaj steloj oriĝis. Ili ŝajnis esti juvelaro sur la blua kolo de l' ĉielo.

Mi volis eksalti kaj flugi en la aero por preni stelojn kaj reveni al la griza tero, por eklumigi ĝin.

De tiu mirinda vespero mi senĉese revis pri nova veturado en la nuboj. Mia dezirata kavaliro havu flugilojn de l' aeroplano! Mi estas vere malfeliĉa, kiam mi aŭdas zumon de l' aparato. Tio estas grandega, dolora sopiro je la aero. Homo kiu almenaŭ unufoje flugis, ne povos vivi sen flugado Mickiewicz en sia poemo inspire vokas:

— Kiu dum la vivo almenaŭ unufoje estis en la ĉielo, tiu poste ne tuj trafos al tiu ĉielo.

Kaj mi pensas, ke mi longe erariros al tiu ĉielo, al kiu mi estis tiel proksima!

WÜRKERT.

## LULILO KAJ ĈERKO.

Da paclokoj ekzistas multe en la vivo, kaj kiu ne konas inter ili la du gravajn? Unu staras sur enirsojlo de la vivo, la alia sur elirsojlo de tiu ĉi. Diferencaj, tre diferencaj ili ŝajnas esti, kaj tamen ambaŭ ili estas al si proksimaj kaj parencaj.

El tabuloj estas lulilo farita kaj ankaŭ la ĉerko. En arbaro staris iam la arbo, el kiu oni prenis tabulojn. Freŝa kaj verda etendis ĝi siajn branĉojn kaj tiam ripozis laca vojaĝanto sub ĝi. Fine oni faligis la arbon — ĝia trunko estis distranĉata kaj en trankvila laborejo prilaborata; unu lulilo kaj unu ĉerko devenis samtempe el ĝia ligno. Lulilo kaj ĉerko kreskis do iam fortaj kaj plenaj, kiel arbara kaj frukta arboj; sur ĝiaj branĉoj kantadis birdoj. Ambaŭ ili estis iam en printempo folihavaj kaj aŭtune senfoliiĝitaj, ambaŭ ili falis pro hakilo kaj ventego.

Kaj en ambaŭ dormas la homo en ripozo kaj paco. Kiel senkulpa suĉinfano

kuŝas li en lulilo, nenia mizero tedas ĝin, pura kaj sennuba estas la ĉielo de ĝia vivo. Estas alie kun la ĉerko? Ankaŭ en ĝi dormas la homo, ankaŭ lin trafas nenia malbono, nenia mizero. Vere alia dormo ĝi estas, ol tiu en la lulilo, ĉar nun estas ĝi fera, sensonĝa kaj malvarma, sed firme kaj kaŝite tenas ĝi la dormanton.

En ambaŭ ni ne iras mem, oni metas nin tien. Ĉar senhelpaj kaj malfortaj ni estis ankoraŭ, kiam ni en brakoj de la patrino sidis, de ŝi ricevadis kion ni bezonis, ankaŭ la ripozon. La patrino prenis nin de la brakoj kaj metis nin ame kaj dolĉe en la lulilon. Rigidaj kaj palaj, senigitaj de la forto kaj movo ni estas en la morto, oni metas nin en ĉerkon, ĉar mem ni ne povas nin kuŝigi.

Lulilo kaj ĉerko — ĉe ambaŭ oni ploras. Kiu ne konas larmojn de ĝojo, kiuj en patra kaj patrina okuloj brilas, kiam ili sur la lulilon de la infano rigardas? Kiu ne konas la larmojn de doloro, kiuj brilas en okulo de la infano, kiam ĝi apud la ĉerko de la gepatroj staras? La gepatroj metas siajn infanojn en lulilon kaj laŭregule la infanoj siajn gepatrojn en ĉerkon. Larmoj estis ĉi tie kaj tie.

Lulilo kaj ĉerko — ĉe ambaŭ oni esperas. Jes, la espero movas koron, dolĉa espero lumas nin renkonte, kiam ni ĉe la lulilo de niaj karuloj staras. Per morto estas tiu ĉi ligilo disŝirita, sed ni esperas kun certeco, ke ĝi kunligiĝos ree fortike tie supre, kaj tiu-ĉi certeco estas ĉe la ĉerko nia ankro, nia konsolo.

Lulilo kaj ĉerko — ĉe ambaŭ oni preĝas. Piaj deziroj, pensoj kaj sentoj supreniras el koroj de gepatroj ĉielon, kiam ili ĉe la lulilo de la infano staras, pro feliĉo kaj beno por la karulo preĝas al Dio. Ankaŭ apud la ĉerko ni preĝas, ni petegas por la mortinto favoran juĝon, ĉielpacon kaj feliĉon.

Lulilo kaj ĉerko — ĉiam vi ŝirmos la homojn — vi ambaŭ estas luliloj: unu por la tero, la alia por la ĉielo.

**Tradukis el germana lingvo Karol Mikoŝ.**

# RECENZOJ.

HERMANN HAEFKER: **Jarmiloj pasas.** Universala historio verkita originale en Esperanto. 1930/31. Eldonis: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanlando.

Esperanta literaturo riĉiĝis per tiu ĉi nova, tre valora verko.

En vico de tre interesaj ĉapitroj disvolvas la aŭtoro antaŭ niaj okuloj la historion tutmondan — ekde la plej antikvaj nebulaj epokoj, kiam aperis la unuaj, senformaj ĉeloj, kiuj devis trans jarmiloj ŝanĝiĝi ĉe la plej alta speco de l' kreaĵo, nomita — homo.

Ĉar, kiel diras la aŭtoro, historio ne estas romano, sed scienco — li science klarigas tiun evoluon de l' homaro helpe ne nur de historiaj fontoj, sed ankaŭ de l' filozofio, astronomio kaj sociekonomio. Ĉie kaj ĉiam li serĉas kaŭzojn, kialojn de l' aperintaĵoj, kaj trafe, saĝe ilin substrekas.

La majstra rakontadmaniero de l' aŭtoro faras, ke de la komenco ni devas legi lian libron senripoze ĝis la fino, por senĉese miri pri la logika maniero, en kiu li disvolvas sian pacideon en tiu eposo pri sango, larmoj kaj rezigno. La leganto nepre devas esti certigita, ke la neceso de l' universa paco ne estas neatingebla revo de idealuloj, sed la saĝa, prava kondiĉo de l' estonta homara estado.

La apero de tiu libro estas grandsignifa por la Esperantistaro. Eble ĝi estas la unua alaŭdo de originalaj, sciencaj niaj verkoj, eble ni povos baldaŭ starigi fiere kaj ĝoje tutan bibliotekon. Vivant sequentes!

**M. Szczepańska.**

GEOFFREY D. NASH: **Miniaturoj.** Originale verkita poemaro, eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd. — Aĉetebla ĉe Brita Esperantista Asocio 142 High Holborn, London, W. C. 1. Anglujo. — Prezo 2 ŝ. 6 p.

Ne ĉiu pentristo kuraĝas pentri miniaturojn, ĉar tiu ĉi artspeco insiste postulas majstran certecon de l' tekniko.

Kiel en veraj miniaturoj ju pli eta estas la bildeto, des pli forte videbliĝas ĝia artismo, tiel malgrandaj du, tri aŭ kelkstrofaj poemoj de Nash, devigas nin

al admiro pro sia elsercîta gracio. Ĉu povus nin ne ravi agordplena elegio „Eta manet' ", kiun ŝajnas akompani la marmurantaj tonoj „tik—tak" de l' „Ava horloĝ' "? — Ĉu ne al ni el orumita kadro ridetas la pasinteco per „buŝeto flor-simila" de „Eta praonklino"....

Ni devas konstati, ke s-ro G. Nash en siaj „Miniaturoj" donacis al esperanta leganto miniaturpoemojn en tre alta speco de tiu ĉi verkadmaniero, dank' al kiu forte sin notas en memoro tiu ĉi plastik-kolora serio de l' poemetoj, formante tutaĵon tre interesan kaj ne kutiman. **Z. Ćwiklińska.**

KOLOMANO KALOCSAY: **Streĉita Kordo.** Poemaro. Eldonis Literatura Mondo. Budapest. Pĝ. 190. Ricevebla ĉe Pola Esp.

Kalocsay, tiu granda majstro de l' rimoj kaj ritmoj, feliĉigis nin per sia nova verko, kiu por esperanta mondo estas revelacio!

Belsonaj rimoj, lerta tekniko kaj ritmo, kreas por leganto veran spiritfeston. Neĉiutaga estas ĉarmo de tiuj versoj! Ili sonas tiel bele kaj subtile, ke povas ravi homojn, kiuj eĉ ne konas la lingvon. Ili estas tiel melodiaj, ke aŭskultante oni volas alvoki muzikon kaj kanti en sia animo dankeman himnon al nia granda poeto. Denove Esperanto montris sian forton kaj ĉarmon!

Malodinara fantazio de l' poeto montras sian riĉecon en varieco de l' agordoj. Leganto, kies tutan amon posedas la aŭtoro, senvole kaj senrimarke ŝanĝas sian humoron kaj sentojn kune kun la verkisto. Do ni iomete mokas kritikistojn en la spritaj „Veoj pri la asonancoj". Poste ni fariĝas romantikaj kaj post kelkaj paĝoj paganoj, aŭskultante belegan himnon al la Diino de l' Amo. Refreŝigas nin melodio de senhejmulo, kortuŝas versoj al S-o Cart kaj pri la morto de Zamenhof.

Morto, amo kaj vivo, senzorga papilia vivo ravas kaj amuzas egale.

**Priskribante la naturon (kvar sezonoj de l' jaro), kio estas tro konata temo,** la aŭtoro donis al ni belegan kaj malfacilan formon de l' soneto. La sentoj de l' naturo, kiuj en sonetoj pli bone estas sentoj de l' animo, kreas specialan valoran ĉarmon.

Poeto estas super la popoloj kaj super la lingvoj. Sed speciale la lingvo esperanta havas feliĉon posedi tiun grandan talenton. Kaj same la autoro havas grandan feliĉon, ke li povas kanti en tiu, tiel belsona lingvo, kiel nia **kara** Esperanto. **Irena Szczepańska.**

JULIO BAGHY: **Printempo en la aŭtuno.** Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto. 1931. Eldono de Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo. Paĝoj: 114.

Jam la titolo montras, ke en tiu ĉi libro devas esti multe da suno. Ĝi estas kortuŝa rakonto pri du trovitaj infanoj, knabo kaj knabino, kiuj renkontas sin kaj enamiĝas reciproke. Kreskas kaj floras ilia amo, kaj la amfloroj odoras tiel bele, ke la knabo havas printempon en sia koro. Li estas gimnaziano, ŝi nur komediantino, kaj ili devas adiaŭi sin kaj disiĝi. Ŝi migras al alia loko, li restas kun doloranta koro kaj memoro pri la bela, aŭtuna printempo.

Mi supozas, ke ĉiu volonte tralegos la libron, kaj la bela, kvankam facila lingvo faros plezuron por la leganto. **H. Kantorowicz.**

C. WALTER: **Gajaj horoj por Esperantistoj.** Spritaĵoj, Anekdotoj, Ŝercdemandoj, Preseraroj, Vortludoj, Societludoj por gajigi grupojn, izolulojn, kursgvidantojn, lernantojn. Tria eldono. Aĉetebla ĉe la aŭtoro: Berlin W. 10 (Germanujo) Hohenzollernstr. 11. Paĝoj 56. Prezo: 0.50 RM. aŭ du respondkup.

La libreto enhavas kolekton da bonaj ŝercoj, parte tradukitaj de la aŭtoro aŭ ĉerpitaj el diversaj gazetoj. La aŭtoro tre sukcesis, tradukinte la societludojn. — Bonege, ke ni havas ion, kio gajigus kaj ridigus grupajn kunvenojn. Ni esperu, ke ĉiuj grupanoj pere de tiu libreto ludante kaj amuziĝante kune interamikiĝos. — Diversnaciaj esperantistoj povas bone, ne enuante, pasigi la tempon kaj babilante en la lingvo, akiri pli fundan ĝian konon.

**Ewa Buchsbaum.**

C. WALTER: **Gajaj Vesperoj.** Paĝoj: 80. Prezo: 1 RM. Aĉetebla: kiel la supra.

Aperis malgranda libro (domaĝe, ke tiel malgranda), kiun la leganto komencinte legi, legas kun kreskanta interesiĝo seninterrompe ĝisfine. Nenio strange! La libro estas tiel interesa, tiel amuza! Kaj skribita facil- kaj belstile. Jam en antaŭparolo la aŭtoro skribas: „La libro havas du taskojn. Mi sincere deziras, ke ĝi plenumu ambaŭ. La unua tasko estas: amuzi la esperantistaron. La dua tasko estas: fari la grupvesperojn tiom gajaj kaj amuzaj, ke la grupanoj vizitu la grupvesperojn kun vera plezuro kaj restu fidelaj al la grupo kaj al la lingvo Esperanto".

Kaj li ne trompiĝos. Lia sincera deziro tute plenumiĝos. Estas dezirinde, ke ĉiuj verdstelanoj legu tiun-ĉi libron, kaj... ke la aŭtoro ··el eble plej multajn tiajn librojn eldonu. — La libro konsistas el kelkaj partoj, nome: 1) Spritaĵoj, anekdotoj. 2) Humoraĵoj. 3) Diversaĵoj. 4) Reguloj por ĝvidantoj. 5) Programkonsiloj por grupkunvenoj. 6) Ludoj. Juljusz Ortsmann.

# POLLANDA KRONIKO.

**BYDGOSZCZ.** La aperanta ĉi tie „Volkszeitung" enpresas ĉiusemajne Esp. angulon. Fine de novembro okazis publika prelego de prof. Peliński s. t. „Kun Esperanto ĉirkaŭ la terglobo". — Dum la ĝenerala kunveno de Esp. — Rondo oni elektis kiel honormembrojn s-ojn Dron Lewiński, S. Schulz kaj parlamentdeputiton Pankratz. — S-o Jean Forge okaziĝis bonege sukcesintan provlecionon laŭ la metodo de pastro Cseh.

**CHEŁMNO** (Heŭmno): Aŭdu ĝesamideanoj! En Chełmno en monato julio formiĝis oficiale registrita „Pola Esperanta Societo". Oni elektis prezidanto s-on Mr. K. Schreyer (Ŝrajer) apotekiston, Vicprezid. s-on Ceraficki — Inspektoro de esperanta kulturo s-on prof. Radzimiński — Sekretario St. Malinowski presiston kaj kasisto s-on Ciemnoczołowski presiston. Tiu ĉi nova societo disvolvas viglan agadon. Por ekzercado en skribo kaj vorto oni fondis gazeton principe por sia propra utilo, kie ĉiuj membroj devas loki siajn ellaboraĵojn en lingvoj pola kaj esperanta. Unua kaje o estos eldonita 15-an de decembro en datreveno de naskiĝo de Zamenhof, kiel pruvo de honorita Majstro kaj viva forto de disvastiĝanta problemo de mondlingvo.

Krom en Esperanta Societo, oni propagandas Esperanton en Korpuso de Kadetoj N-o 2 kiel deviĝan lingvon en tri klasoj de unua kompanio a. b. c — kaj vespere kurson en dua kompanio. Entute lernas 150 kadetoj — instruisto estas s-ro prof. Radzimiński. Por festi dekkvaran datrevenon je 15-a decembro prepariĝas tuta esperanta mondo en Chełmno (Pomeranio).

**KRAKÓW.** La 3-an de novembro prof. T. Biliński inaŭguris novan serion de kursoj, aranĝataj de Pollanda Esp.-Instituto, per pollingva prelego s. t. „Parizo, urbo de lumoj kaj ĝojo..." Granda prelegejo en Muzeo Industria tutpleniĝis. Rezulto tre bona: tri diversgradajn kursojn, ĝvidatajn de s-o Hodakowski, aliĝis ĉ. 130 personoj.

**LUBLIN.** La gazeto „Ziemia Lubelska" enpresas esp. anguleton. Okaze de la festo de sendependeco oni aranĝis esp. solenaĵon kun programo en pola kaj esp. lingvoj. Preparis ĝin s-oj dro Mędrkiewicz kaj Pruski.

**TARNOWSKIE GÓRY.** De la 6. 10.–27. 11. funkciis kurso kun 10 personoj. Antaŭ la kurso okazis vasta propagando, i. a. estis aranĝata efika E-ekspozicio en montrofenestro de librejo de Jan Muszkiet. Kvankam por la pagata kurso anoncis sin nur 10 pers.: la ekspozicianta librejo mem vendis kelkdek lernolibrojn (certe signo de la hodiaŭa ekonomie malfavora tempo, ke iuj interesuloj elektas malplikostan vojon. t. e. memlernadon). La librejo, tre favora al propagando de la mondlingvo, konstante ekspozicias Esp-aĵojn kaj havigis por sia stoko ĉiujn verkojn tradukitajn el la pola lingvo en Esperanton.

La 13. 12. la loka grupo „Konkordo" aranĝos p. k.-vesperon.

**WARSZAWA.** La Esperanto-movado ĉe ni lastatempe tre vigliĝis. Oni povas certe diri, ke la Un. K. grandege influis la pliviglîĝon de la movado. La mezurilo estu tie ĉi kelkaj nombroj de aliĝantoj al Esp.-Kursoj. La Akademia Esp. Rondo (Nowy-Świat 21) — ekde jaroj ĝvidas Esp.-kursojn, sed ĝis la lasta jaro, la plej granda nombro, kiu partoprenis kurson ne superis 30 personojn. Ni eĉ ne kredis, ke oni povas atingi pli grandan nombron. Niaj lastaj pruvoj konvinkis nin tamen, ke la ebleco estas tre riĉa je faktoj. Dum somero ni aranĝis 4 kursojn t. n. „Kongresaj Kursoj". Al 4 kursoj aliĝis po 45—65 personoj, kio sume atingis nombron de preskaŭ 250 personoj. Poste ni aranĝis ankoraŭ 2 kursojn, kiujn partoprenis pli ol cent personoj. Krom tiuj lastaj du elementaj kursoj, funkcias nun ĉe ni 2 superaj kursoj, kiujn partoprenas ĉirkaŭ 60 personoj. Tamen tre menciinda fakto estas, ke lastatempe aranĝas Esp.-kursojn ne esperantistaj asocioj. Oni jam notis, ke la Landkonema Asocio en Warszawa enkondukis tiujare konstantajn Esperanto-kursojn. Nun enkondukis Esperanto-kursojn konstantajn du tre gravaj kaj multmembraj asocioj en Polujo, kies centrejoj troviĝas en Warszawa.

Unu el la asocioj estas „La Popola Universitato". Ĝia estraro invitis s-anon I. Dratver por kursgvidado. La unuan kurson partoprenas 35 pers.

La dua asocio estas „Ligo de Virinoj" „I. F. O" Antaŭ monato ili invitis Estraranon de Akademia Esperantista Rondo, s-anon Henrikon Gielb funkciigi **de la kurson, kiun partoprenas kaj tre fervore lernas 53 personoj.**

Ni esperu, **ke tiu kursanaro baldaŭ fariĝos** fundamento por nova Esperanto-Grupo en Warszawa. (K al krei etain, novajn organizaĵojn. Ĉu ne estas pli bone vigligi la ekzistantajn? **Noto de la Red.).**

De 21—29 de junio k. j. okazis en „Ŝtata Lernejo de Voj- kaj Pontkonstruado" ekspozicio, organizita de „Frathelpa Societo" de tiu lernejo. En la ekspozicio partoprenis Esp.-Rondo, kiu en 2 salonoj montris multeĝon da interesaj eksponaĵoj. Esp.-fako konsistis el subfakoj: tekniko kaj scienco, komerco kaj industrio, turismo, beletristiko, gazetaro kaj korespondado. Impona kaj bela **aranĝo kaŭzis la plej viglan interesiĝon de la vizitantaro. Esp.-fakon vizitis 1840** personoj, inter kiuj estis nur 3 esperantistoj.

Oficistoj de la Poŝtŝparkaso fondis Esperanto-grupon kaj funkciigis kurson kun 15 personoj.

**WILNO.** En Juda Landkonema Societo (Ż. T. K.) s-o S. Szyk raportis **kun bildoj pri la 23-a Un. Esp. Kongreso kaj Postkongresoj. Ĉeestis multnombra aŭs**kultantaro. La raportanto ankaŭ prelegis s. t. „Signifo de Esp. por turismo". **Post provleciono kaj ludo de l' esp.-himno per gramofondisko aliĝis al la komenciĝanta kurso ĉirkaŭ 60 personoj.** Gvidas s-o S. Szyk.

## ESPERANTO EN USON-LITOVA ĴURNALO.

Estinta ano de la „Delegation pour adoption d' une langue auxiliaire inter**nationale" Dro Petro Buĉiso (Buczysz), nun misiista katolika episkopo de l' orien**ta rito lastatempe gastas en Usono inter siaj samnacianoj, Litovoj, Ukrainanoj kaj Rusoj kaj eĉ Poloj lin bonvenigas. Ilia ĵurnalo lin treege reklamas. Unu litova ĵurnalo: „Zvaigżde" krom litovlingvaj skribaĵoj pri li enmetis en sian eldonaĵon jenan esperantlingvan poematon: „**Jen grandul' de Litovio** — kaj orientrita — Episkop' de l' Eklezio — Estro altigita. — Granda estas scienculo — li - jen aksiomo... — Kaj ankaŭ vera pinlo: — Buĉis' — lia nomo. — Por li sonos ĉiu liro — de la poetaro, — Ĉar ja estas tiu viro — Por bon' de l' homaro. — Li jam estas kvazaŭ dio — De l' litova gento — Kaj kolon' de l' Eklezio — De la oriento..."

**Miriamido.**

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. **Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Marszałka Piłsudskiego 33.**
Konto ĉe PKO No 60.047.

### OFICIALA BULTENO N-o 25.

NOVA ASOCIA JARO. Ĉiuj ĝisnunaj mebroj de UEA ricevis en Novembro specialan numeron de „Esperanto" kun invito al realiĝo por la jaro 1932. Mi esperas„ ke ĉiu ricevinto restos fidela al nia Asocio kaj petas plenigi la aliĝilon kaj transdoni ĝin kun la kotizo al la loka Delegito aŭ — se ne estas — rekte transsendi la aliĝilon en fermita koverto al la Ĉefdelegito, pagante samtempe la kotizon je poŝtĉekkonto N-o 60.047. La kotizoj por la jaro 1932 restas senŝanĝaj: Helpmembro — Zl. 3.—, Membro — Zl. 6.—, Membro-Abonanto — Zl. 15.—, Subtenanto — Zl. 45.—, Dumviva Membro — Zl. 500.—. La kotizo de Dumviva Membro estas pagebla en daŭro de 3 jaroj, ĉiujare po 1/3. Membro-Abonantoj, Subtenantoj kaj Dumvivaj Membroj rajtas ricevi dum la jaro 1932 „Polan Esperantiston" por speciale rabatita prezo Zl. 5.— anstataŭ Zl. 8.—. Tiu favora abonprezo estu pagita al la loka Delegito aŭ al la Ĉefdelegito. La administracio de „Pola Esp." ne akceptas rekte sendite senditajn rabatajn abonpagojn.

PREMIOJ POR FRUPAGO. Ĉiu, kies pago atingos nin ĝis la 31-a de Januaro 1932 rajtas laŭ la ĝis nuna kutimo ricevi SENPAGE unu el la jenaj premioj laŭ sia elekto: 1. Bildo de Zamenhof. 2. Fundamento de Esperanto, eldono 5-lingva. 3. Katalogo de lingvoj naturaj, popolaj, literaturaj klasikaj kaj artefaritaj. 4. A. Drozdov — Krucumo. 5. Walter — Gajaj vesperoj. 6. De Ségur — Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj. 7. R. Kreuz — 500 komercaj frazoj. 8. Mesa... — Spite la vivon (poemoj). 9. Protokolaro de XIV, XVIII kaj XXII Univ. Kongresoj de Esp. (3 libroj). 10. Jarlibro de UEA por 1924. 11. Jarlibro 1926. 12. Jarlibro 1928. 13. Jarlibro 1930. 14. J. Zawada.

Adreslibro de pollandaj Esperantistoj. 15. W. Bonsels. Ŝolandro. Krom tio „Datoj kaj faktoj de paca movado". 16. Dro Privat.-Esprimo de sentoj en Esperanto. 17. Dro Ferrière — Estonta Eduko. 18. H. Hodler. Lia vivo kaj verko. 19. R. Schwartz. Verdkata Testamento. 20. Turisma kolekto (materialo por ekspozicioj). 21. J. Merchant. Tri Angloj alilande. 22. Islando lando, vivo kaj literaturo. 23. Grenkamp-Kornfeld. 5.000.000. 24. Julio Baghy — Dancu, marionetoj! 25. Baghy-Viktimoj.

PREMIOJ POR SUBTENANTOJ. Belajn libropremiojn ricevas la Subtenantoj laŭ speciala listo, ricevebla ĉe la Delegitoj aŭ rekte de la Ĉefdelegito laŭ peto.

LASTA ALVOKO AL LA NEREPAGINTOJ. Kelkdek niaj membroj bedaŭrinde ne repagis sian kotizon por 1931, nek respondis al niaj dufojaj skribaj admonoj. Fermonte nun la liston por la jaro 1931 mi tre petas, ke ĉiuj, kies financaj eblecoj tion permesas, bonvolu rapide repagi sian kotizon por la jaro 1931. Ili tuj ricevos la Jarlibron kaj la ceterajn dokumentojn.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Decembro 1931 ni havis en Polujo 451 membrojn (4 DM, 16 MS, 235 MA, 173 M, 23 HM) kaj 1 Esp. Entr. Je la sama dato pasintjare ni havis nur 391. Nia membraro pliiĝis do je 60 anoj, kio signifas ĝojigan progreson. Tio estu por ni instigilo por plua varbado kaj pligrandigo de la anaro en la lando de la nunjare okazinta bela mondfesto Esperantista. Por la jaro 1932 pagis jam sian kotizon: 4 DM, 1 MS, 8 MA, 6 M, 3 HM, kune 22 anoj kaj 1 Esp. Entr.

NOVAJ DELEGITOJ: Plezure ni anoncas jenajn novajn Delegitojn:

IRENA. D. Marjan Grodzki, leŭtenanto, Lotnisko No 35 m. 4, Dęblin.

WARSZAWA. D. Włodzimierz Miernicki, fotografisto, Marszałkowska 88.

VD. Halina Weinstein, studentino, Leszno 99, lĝ. 5. (ĝen korespondado).

VD. Henryk Münch, bankoficisto, Bank Gosp. Krajowego (komerco kaj industrio).

VD. Eugenjusz Rytenberg, teknika fabrikgvidanto, (gazetaro)

VD. Ewa Szatz, Długa 8a, (turisma servo).

VD. Roman Ignaciuk, kompostisto, Młynarska 14 (propagando kaj varbado).

La nova Delegitaro en la ĉefurbo estas elektita dum la kunveno de UEA-anoj, okazinta la 24. 10. n. j. suб prezido de f-ino Dro Sofio Zamenhof.

Białystok, la 1. XII. 1931. J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.

**KOMUNIKAT.**

Zarząd Główny Robotniczego Stowarzyszenia Esperantystów „Praca" (Laboro) w Polsce niniejszem komunikuje, że robotn. Grupa esperancka, działająca na ul. Zamenhofa 8. w Warszawie, nie jest Filją naszego Stowarzyszenia i że tymczasem pracę na terenie Warszawy prowadzi tylko Zarząd Główny bez żadnych filij. Wydawany przez tę-że grupę podręcznik Esp. Gelenberga nosi nieprawnie firmę „Laboro" jako wydawcy.

**ALVOKO.**

Virinoj atentu! Grave! Paco kaj Esperanto estas ĝefratoj. Por simpatiiĝi al Esperanto estraron kaj membrojn de la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco ni petas la kunlaboron de ĉiu samideanino, kiu estas ankaŭ membro de I. V. L.

Sendu vian adreson aŭ al Helene Wolff, Cleve Emmericher Str. 28, aŭ al Elise Jacobs, Flensburg, Mathildenstr. 9, Germanujo.

# DE LA REDAKCIO

**Plej korajn gratulojn okaze de la Kristnaskaj Festotagoj kaj jarŝanĝo sendas al siaj Est. Abonantoj, Legantoj kaj Amikoj**

**Redakcio kaj Administracio de „Pola Esperantisto".**

**ĈIUJ AŬSKULTU!**

Ni ripetas, ke la **15-an de decembro** je la **17 h 10 m** prelegos s-o **prof. O. Bujwid** per ĉiuj radistacioj polaj s. t. **„L. L. Zamenhof kaj lia eltrovo de la helpa lingvo".**

Gesamideanoj, nepre **ĉiuj aŭskultu. Se iu el vi ne havas propran radiricevilon, li iru al siaj konatoj, profitante tiel la okazon propagandi la aferon inter la radiamatoroj.** Tuj post la prelego skribu **dankleterojn al Dyrekcja Polskiego Radja — Warszawa,** petante pri regulaj prelegoj aŭ kurso esperantaj.

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss, Kraków.
Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, ul. Stolarska 6.

## La ilustrita semajna gazeto

# Heroldo de Esperanto en 1932 refoje pliperfektigota

**NIAJ ĈEFAJ RUBRIKOJ KAJ ALDONOJ:**

**Esperanto vivas** (Kroniko)
**Kreskas nia literaturo** (Bibliografio)
**Parolas la leganto** (Libera Tribuno)
**De mardo al mardo** (Tra la mondo)
**Niaj leteroj el la tuta mondo**
**Inter mikrofono kaj anteno** (Radio-paĝo)
**La regno virina** (Virina paĝo)
**Sur la kvin linioj** (Muzika paĝo)
**La romana paĝo** enhavos en 1932 romanon el la plumo de fama nuntempa hispana aŭtoro.

**NOVE ARANĜOTAJ:**

**La bela mondo** (Turisma paĝo)
**La strigo** (Paĝo por literaturo kaj arto)
**Nia gazeto** (Aldono por la junularo)
**Nia lingvo** (Survoje al konsilanta gramatiko)
**Humoro, distro, ludo.**

## Ĉiun duan semajnon unu premia tasko!
## Ĉiun duan monaton unu enketo!

Nia Librofako eldonas valorajn verkojn, originalajn kaj tradukitajn el diversaj lingvoj. Speciale rekomendindaj estas la verkoj de E. M. Remarque: **En okcidento nenio nova** kaj **La vojo returne,** krome la unua mondhistorio originale verkita en Esperanto de H. Haefker sub titolo: **Jarmiloj pasas.** En nia stoko troviĝas ankaŭ ĉiuj nuntempe haveblaj pli gravaj verkoj de la Esperanto-literaturo. Petu **senpagan specimenon de Heroldo** kaj nian **senpagan ilustritan Librokatalogon!**

HEROLDO DE ESPERANTO, BRÜSSELER Str. 94, KÖLN (Germanujo).

? Ĉu vi
ANKORAŬ NE
pagis vian
KOTIZON AL U. E. A.
por la JARO 1932?

SE NE —
tiam rapidu fari tion tuj!

## Vi rajtas elekti belan libropremion !

Petu detalojn de la Delegito
en via loko aŭ rekte de la

Ĉefdelegito J. Ŝapiro, Marsz. Piłsudskiego 33, Białystok.

MEMORU, KE FORTA U. E. A. HELPOS AL FINA TRIUMFO DE NIA AFERO!

Ciu KONSCIA Esperantisto estu membro de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO!

---

10%-an rabaton
okaze de

# „FESTO DE LA LIBRO“

ricevas ĝis la 31 de decembro k. j. ĉiu aĉentanto ĉe

LIBREJA FAKO

## DE „POLA ESPERANTISTO“
## KRAKÓW, UL. LUBICZ 34.

Postulu senpagan katalogon!

---

**NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1931!**
**Pagu la abonon je nia konto PKO 406.660.**
**Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!**
**Abonu la polan propagandan revuon „Pomocniczy Język Światowy“.**

---

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

**Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, Stolarska 6.**

KUL